



FENIKSO/ INFORMILO POR

AMIKA  
RONDO DE  
ESPERANTAJ -  
KOLEKTANTOJ

N-roj 32/33                      15.5.1975      sepa jaro, n-roj 1-2

Afergvidanto de AREK: Ivar PAULSSON, Algatan 3/III, S- 171 33 SOLNA (Svedujo), p.ĉ.k. 51 57 85-4; redaktoro de "Fenikso": d-ro Antonio DE SALVO, C.P. 4017, I-00100 ROMA APPIO (Italujo), p.ĉ.k. 1/50317; jara kotizo: 10 internaciaj respondkuponoj aù egalvaloro.

### ADIAŬO

=====

En la pasinta numero de "Fenikso" mi promesis, ke mi liveros duoblan numeron en majo 1975, por kompensi la longan neaperadon. Hodiaù mi plenumas mian promeson.

Interne de ĉi tiu bulteno vi trovos informon, ke post la U.K. de Kopenhago AREK kunfandiĝos kun ELF (Esperanto-Ligo Filatelista), kaj naskiĝos nova gazeto "La verda Lupeo/Fenikso".

Antaù 3 jaroj mi "provizore" transprenis la redaktadon de "Fenikso" por eviti, ke ĝi mortu kune kun JENSEN. La celo estis atingita. "Fenikso" ne mortos, sed transformiĝos. Kaj mi povas serene transdoni la redaktan taskon. Antonio DE SALVO

## MARCONI, POPOV, RADIO KAJ ESPERANTO

(Per ĉi tiu teksto, akompanata de taŭgaj filatelaĵoj, mi partoprenis en nacia filatela ekspozicio en Milano, dum novembro 1974-a, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Guglielmo MARCONI. La teksto, komplete aŭ en konciza formo, aperis ankaŭ en pluraj Esperantogazetoj. Mi esperas, ke ĝi povos interesi miajn AREK-amikojn)

"POPOV INVENTISTO DE RADIO" estas skribite, en Esperanto, sur du sovetaĵoj poŝtmarkoj eldonitaj en 1925-a, kiuj ricevis, pli poste, surpreron kun novaj prezoj. Ĝuste ĉi tiu kurioza fakto stimulis min pliprofundigi la rilatojn inter Popov, Marconi, Radio kaj esperanto.

Antaŭ ĉio, kial la soveta registaro de tiu tempo decidis propagandi ĝuste en Esperanto la aserton, ke inventisto de Radio estas la soveta sciencisto POPOV, anstataŭ la italo Guglielmo MARCONI?

Certe, tio ne okazis ĉar la Esperantistoj estas aparte konvinkitaj pri la soveta tezo, sed pro aliaj kaŭzoj. Ni povas fari kelkajn supozojn.

Dum iu periodo (ni diru, proksimume, ĝis 1932-a) la soveta reĝimo pozitive taksis Esperanton, pro la "humana" kaj "progresema" karaktero de ĝia movado, kaj aprecis la klopodojn de la Esperantistoj, kiuj agis laŭ principoj de internacia solidareco. Rezulto de ĉi tiu w favora sinteno de w la tiutempa soveta registaro estis, interalie, pluraj poŝtmarkoj kun teksto en Esperanto; kelkaj el ili celebris aŭ propagandis Esperantistajn eventojn (ekzemple, la 6-an Internacian Proletarian Kongreson de Esperanto, kiu okazis en Leningrado en 1926-a, aŭ la 40-jaran datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, celebratajn en 1927-a); aliaj poŝtmarkoj,

kontraŭe, prezentis tute ĝeneralajn temojn (la Centran Telegrafejon en Moskvo, Elektran Centralon laŭ nomo de "Lenin", la jam menciitan Popov), kun skribaĵoj en Esperanto, tamen sen iu ajn ŝajna rilato kun la internacia lingvo. Eble, la tiam ankoraŭ vivantaj idealismaj principoj de la oktobra revolucio ebligis ĉi tiun blovon de internaciismo; aŭ eble oni uzis Esperanton apud la rusa por montri, almenaŭ formale, ke la nova soveta socio rezignas je subpremado de la diversaj etnøj kaj lingvaj minoritatoj interne de la granda eŭropazia ŝtato; aŭ - kiu scias - ludis la opinio, ke ZAMENHOF es tis "rusa" hebreo (ni ne volas ĉi tie deflankiĝi de la temo, kaj analizi ĉi tiun aserton; pri la nacieco de Zamenhof aperis hone dokumentita artikolo en la revuo "Kontakto").

Ankaŭ alian supozon oni povas fari. Esperanto estas aparte taŭga por diskonigi mondscale informojn kaj opiniojn, ĉu pro la teritoria disvastiĝo de la Esperantistoj, ĉu pro la natura tendenco de la parolantoj de la internacia lingvo serĉi homajn kontaktojn, diskonigi faktojn kaj ideojn, kaj konservi esperantaĵojn. La esperantistoj, unuvorte, estas bonega propagandilo ankaŭ de opinioj, kiujn ih ne akceptas. Alivorte, Esperanto estas teknika rimedo - tute samkiel radio - tre efika por disvastigi ideojn, ĉiajn ideojn, sen ke tio signifas, ke Esperanto (samkiel radio) havas necese iun partiecan sintenon aŭ koloron.

Ekzemple, en la menciita poŝtmarko por la Proletaria Esperanto-Kongreso en Leningrado, aperas en Esperanto ne nur la ordinaraj skribaĵoj, sed ankaŭ frazo en morsa kodo, kiun oni povas vidi ĉirkaŭ la vinjeto. "Proletarioj de ĉiuj landoj, unuiĝu", diras la sinsekvo de punktoj kaj linioj; sed tio ne signifas, ke ĉiuj Esperantistoj nepre samopiniias kun tiu alvoko!

Sed ni revenu al la Radio, kiu, praktike, estas sam

aĝa kiel Esperanto, ĉar en la sama jaro 1887-a Zamenhof publikigis sian unuan gramatikon, bazon de estonta evoluo de la lingvo, kaj HERTZ realigis sian oscilatoron, esencan paŝon survoje al la efektivigo de radio-komunikadoj.

Ekde la fruaj jaroj de Radio, la Esperantistoj klopodis utiligi la internacian lingvon en ĉi tiu nova fako, kie la voĉoj interplektiĝas en la etero, sen videblaj limoj, sed kun la realaj kaj rimarkindaj baroj de la lingvaj malfacilaĵoj.

La unua radioelsendo en Esperanto okazis en la jaro 1922-a, el Newark (Usono) kaj Londono; tuj poste sekvis, en 1923-a, la stacioj de Moskvo, Montrealo kaj Rio de Janeiro; en 1924-a komencis radioelsendojn en Esperanto Prago, Genevo, Helsinki kaj Parizo; la 30-an de marto 1925-a komenciĝis la Esperanto-elsendoj de Radio Roma sur mezaj ondoj, per prelego titoliĝanta "Esperanto kiel komuna lingvo en radiofonio", kiu havis la celon enkonduki radio-kurson pri Esperanto. Aliaj kursoj estis elsenditaj, en 1929-a kaj 1930-a, de Radio Torino; kaj multegaj novaj stacioj aldoniĝis al la listo en la postaj jaroj, kun alternaj fazoj.

Dum la jaro 1973-a (lasta jaro, pri kiu oni havas statistikojn), regule elsendis programojn en Esperanto 22 stacioj el 12 landoj, inter kiuj meritas mencion (krom Varsovio, kiu prizorgas ĉiutage tri programojn) Vieno, Sofio, Berno, Pekino kaj Zagrebo.

Koncerne Italujon, en marto 1925-a oni festis ne nur la 50-an datrevenon de la unua mezonda Esperanto-elsendo de Radio Roma, pri kiu ni jam parolis, sed ankaŭ la 40-an datrevenon de la unua kurtonda elsendo, kiu havis lokon la 22-an de marto 1935-a.

Okaze de la 27-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis tiujare en Romo, la tiama Ministerio pri Popola Kulturo (kiu ankaŭ prizorgis la propa-

gandon al eksterlando) metis je dispono po du semajnaj elsendoj, en unuopa daŭro de 10 minutoj, sur mezaj kaj kurtaj ondoj, kun la aparta celo altiri eksterlandanojn. La rezultoj (kaj koncerne partoprenon en la Kongreso, kaj rilate aŭskultadon de la programoj) estis tiel kontentigaj, ke ĝis la 31-a de aŭgusto 1942-a, malgraŭ la milito, Radio Roma daŭrigis siajn Esperanto-elsendojn. Krome, tiam Radio Roma kutimis okazigi konkursojn inter la aŭskultantoj (samkiel hodiaŭ faras Radio Varsovio), kaj ĉiumonate aperis luksa 60-paĝa presita bul-teno, komplete en Esperanto, kun la programoj de la diverslingvaj elsendoj.

Post la paŭzo de la milito, en 1950-a rekomenciĝis la Esperanto-elsendoj de Radio Roma, nun prizorgataj de la Oficejo de la Prezidanto de la Ministra Konsilantaro (kiu, surbaze de konvencio, utiligas la instalaĵojn de la itala Radio-Entrepreno RAI). La okazo por la rekomenciĝo de la elsendoj estis la Sankta Jaro de 1950-a, kaj la samtempa Internacia Kongreso de la Esperantistaj Katolikoj. Do, ĉijare oni celebras ankaŭ trian jubileon de Radio Roma en Esperanto, nome la 25-an datevenon de ĝia renaskiĝo, kiu - pro kurioza hazardo - okazos en la samaj kondiĉoj de 1950-a: ankaŭ ĉijare, fakte, estas Sankta Jaro kaj la Esperantistaj Katolikoj kongresos en Romo.

La Esperanto-elsendoj havas nun, de kelkaj jaroj, 20-minutan daŭron en ĉiu semajno, kaj temas pri aktualaĵoj, pri "Kurieroj de Esperanto" (kiu ankaŭ pri-traktas, pli ĝenerale, lingvajn problemojn), kaj "Leterkesto" (korespondado kun la aŭskultantoj). La elsendoj okazas dimanĉe, de la 21-a horo laŭ mezeŭropa tempo, nuntempe laŭ la ondlongoj: metroj 25,42 - 30,90 - 41,24, kio egalas al kilohercoj 11800, 9710 kaj 7275.

La korespondado kun la aŭskultantoj (kiu estas la ĉefa termometro por taksu ilian interesiĝon) estas sufiĉe

vigla; eĉ simpla poŝtkarto multe helpas. La adreso estas: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 RO  
MA, Italujo.

Sed ni deflankiĝis de nia komenca temo, kiu koncernis la rilatojn inter Radio kaj Esperanto. Ni revenu al tio.

Krom la "profesiaj" radiostacioj, ekzistas multegaj instalaĵoj funkciigataj de radioamatoroj. MARCONI mem, cetere, estis simpla amatoro, kiam li akiris siajn unuajn sukcesojn!

Ekzistas radioamatoroj, kiuj konas kaj uzas Esperanton, precipe por starigi longdistancajn rilatojn; sed la italoj ne rajtas tion fari, ĉar (nekredeble, sed vere!) la regularo pri radioelsendoj (aprobita la 29-an de marto 1973-a) permesas nur 7 lingvojn (italan, francan, anglan, hispanan, portugalan, germanan kaj rusan). Temas, probable, pri regulo kontraŭa al la tria artikolo de la itala Konstitucio, kiu solene malpermesas diskriminacion surbaze de lingvo, sed fakto estas, ke por la momento tia leĝo ekzistas.

Koncerne MARCONI-n, estas interese rigardi, kian sintenon havis la sciencisto fronte al la problemo de internacia interkompreniĝo.

Kiel konate, MARCONI estis filo de italo kaj britino, kaj li mastris la anglan plibone ol la italan, kiun li prononcadis kun forta angla elparolo. Krome, li havis apartan kutimon je internaciaj rilatoj, ĉar li ofte restadis eksterlande, kaj ĉar li estis diplomato, kiu eĉ reprezentis Italujon dum packonferencoj koneksaj kun la fino de la unua mondmilito. Pro tio, estas vere signifo plena la eldiro, publikigita en la gazeto "L'Esperanto" numero 1-2 de 1934-a (kiun ni jam aperigis en pli frua numero de "Fenikso"):

"Lia Ekscelenca Moŝto Marconi pri internacia lingvo. Dum ĵusa vizito al Japanujo, L.E.M. MARCONI partoprenis bankedon, kiu estis donita je lia honoro

de aŭtoritatuloj kaj eminentuloj de Tokio. Li parolis en la angla, kaj unu el la temoj mallonge pritraktitaj estis la ebleco de internacia lingvo, kiu eventuale formiĝos pere de Radio.

Ĝuste nun okazas al mi - diris L./E.M. MARCONI - ke pro mia nescio de la japana mi estas devigita paroli al vi en la angla. Kiu povas diri, ĉu per la daŭra kaj ĉiam kreskanta uzo de radiokomunikiloj oni iam trovos novan rimedon por esprimi siajn pensojn, kiu povos esti adoptita kiel universala lingvo? Kia plibona kro nigo de la progresoj de Radio, vere, se samkiel la elektraj ondoj ĉirkaŭiras la mondon, la simboloj de ili ĉien disvastigataj kapablos unuigi ĉiujn popolojn en unikan blokon de interkompreniĝo kaj bonvolo! Tio povas ŝajni pli kiel vizio de poeto ol koncepto de sciencisto: sed scienco ne estas tute sen poëzio, kaj havas taŭgan helpon en la fantazio. Cetere, mi opinias, ke mi rajtas aserti, sekve de ĉiuj eksperimentoj faritaj per Radio, ke la plej grandaj ŝancoj kuŝas antaŭ, kaj ne post ni".

La menciitaj frazoj klare montras, kiom akre Guglielmo MARCONI sentis, pro rekta sperto, la gravecon de la lingvoproblemo en ĝiaj homaj sekvoj, kvankam li plene regis la anglan, nome tiun rimedon, kiu laŭ multaj estas necesa kaj sufiĉa por atingi internacian interkompreniĝon.

Antonio DE SALVO, redaktoro de RADIO ROMA en ESPERANTO

P.S. Poë eventualaj interesoĵoj, mi havas je dispono al interŝanĝo plurajn filatelaĵojn pri MARCONI kaj pri Radio. Antonio DE SALVO

KOMPLETIGO DE ADRESO: Doktoro Rosetel A. PRODANESCU komunikas, ke sekve de la aldono de poŝta kodnumero, nun la adreso kompleta estas: C.P. 5817, 7 - BUCURESTI 61 (Rumanujo).

grave-grave-grave-grave-grave-grave-grave-grave-

AREK KAJ ELF KUNFANDIĜOS POST KOPENHAGO

Dum la presado de ĉi tiu numero de "Fenikso" alvenis al la redaktoro ĉi tiu ~~letero~~ de la afergvidanto de AREK, Ivar PAULSSON:

"Fine ni solvis la kunligon de ELF kaj AREK; tion ambaŭ organizoj (Esperanto Ligo filatelista kaj Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj) anoncas per ĉi tiu komuna cirkulero:

""Gekolektantoj!

Post la kunveno dum 59-a U.K. en Hamburgo, ni ege diskutis kiel unuigi la kolektantojn organizojn en Esperantujo. Por komenci la tuton la gvidantoj de ELF kaj AREK diskutis kaj fine decidis la kuniĝon!

DECIDOJ:

1. Dum la kuranta jaro ni estas pretaj jam post la kunveno dum la 60-a U.K. en Kopenhago kunligi la du organizojn ELF kaj AREK.
2. AREK tute simple eniru kiel grupo de ELF.
3. Ni organizas specialajn bankojn por interŝanĝado:  
A) E-pm; B) E-stampoj=INEF -servo (same kiel nun);  
C) E-glumarkoj (same kiel AREK nun havas); D) E-in  
signoj (same kiel AREK nun havas). Nur tiuj 4 grupoj.  
Al tiuj grupoj la membroj povas turni sin por interŝanĝi objektojn.
4. La statutoj de ELF validas kun aldono de supre menciita ŝanĝo, ke ankaŭ kolektantoj de glumarkoj kaj insignoj rajtas aliĝi.
5. Komence la gazeto ricevas la nomon: "LA VERDA LUPEO-FENIKSO".
6. Ni estas faka organizo en UEA, kaj la kunvenoj okazas dum Universalaj Kongresoj.
7. La kotizo estos 10 rkp po jaro (aŭ egalvaloro).
8. Tiu ĉi cirkulero eliros al ĉiuj membroj de ELF kaj



AREK.

Se vi havas alian opinion aŭ ion por aldoni, same vo las demandi pri aferoj de ĉi tiu cirkulero, ni petas vin kontakti kun iu el la gvidantoj.

Nia espero estas, ke ni tiamaniere starigu fortan bazon, pli fortan organizon.

Sincere salutas

Por ELF: Werner HEIMLICH, Fröbelstr.4, D-3040 SOLTAU (Feder. Resp. Germanujo)

Por AREK: Ivar PAULSSON, Algatan 3, S-171 33 SOLNA (Svedujo)""

Sinjoro PAULSSON aldonas, koncerne la novan gazeton: "La Verda Lupeo-Fenikso devas aperi almenaŭ 4-foje jare, kaj eble entenos multe pli da filatelaj aferoj ol nun, sed same la AREK-grupo havos sian angulon por glumarkoj kaj insigno-kolektoj. TREMON daŭre tenos la glm-bankon, kaj HEIMLICH prizorgos la INEF-servon (poŝt-stampojn ktp) //interkrampe ni diru, ke sinjoro Vlada HASALA devis rezigni prizorgi la stampo bankon de AREK, pro objektivaj malfacilaĵoj//.

Tiu ĉi duobla numero de "Fenikso" estas, do, la lasta; post Kopenhago, oni daŭrigos per la nova gazeto (kiu havos emon ĝin redakti?).

La kunligo okazis multe pro tio, ke ELF jam estas faka organizo de UEA, kaj oni ne povas ankoraŭ akcepti organizon pri sama temo, kaj mi arde esperas, ke pli granda organizo donos forton al la movado."

PRI INTERŜANĜADO DUM KONGRESOJ skribas sinjoro I; j; wulfers el Nijmegen (Nederalando): "Mi estis ĉe la kunveno de kolektantoj en Hamburgo dum la U.K.; estis proksimume 40 kolektantoj, sed mi tre bedaŭras, ke nur mi kunportis multajn glumarkojn, kaj mi ne povis interŝanĝi. Mi ne komprenas la homojn: dum la kongresoj ni havas la okazon interŝanĝi kolektaĵojn! Dum la venonta U.K. en Kopenhago mi denove kunportos aĵojn".

PRI LA HUNGARA TUTAĴO VEF/BUDAPEŜTO

Al la demandoj de sinjoro AMOUROUX pri la hungara tutaĵo, mi povas respondi jene:

-la demanditan poŝtkarton eldonis la Hungara Poŝto;  
-sur ĝin dorsflanke nia Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio presigis desegnaĵojn:

1/ Saluton el Budapeŝto,

2/ Virina Tago,

3/ Esperanto-himno;

- dum la 3-a Vintra Esperantista Ferio, do samtempe, la Hungara Poŝto uzis specialan memorstampon, kun esperantlingva teksto.

Johano SZILA'GYI, organiza sekretario de la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA

PRI LA ANTAŬMILITAJ ĈEHOSLOVAKAJ TUTAĴOJ

skribis sinjoro Odon HORÁK el Brno:

"Mi ĉiam klopodas serĉi tiujn tutaĵojn, ĉar de ili mi mem posedas nur unu pecon; bedaŭrinde, ĝis nun sen-sukcese. Tie ĉi en Brno estas "riĉaj borsoj" filatelaj, mi iradas de tablo al tablo demandante pri tiuj poŝtkartoj, sed vane. Siatempe mi interkorespondadis per ili, nelasante ilin por si mem, ĉar mi tiam ne kolektis temon "Esperanto" - bedaŭrinde!"

NOVA E-STAMPO EN JUGOSLAVIO.

La 19-an de aprilo 1975 estis uzita stampo en POHORJE (Jugoslavio). Teksto en slovena lingvo: "50 LET ESPERANTA NA JUGOSLOV. ŽELEZNICAH POHORJE 19.4.1975" (traduko: 50 jaroj de Esperanto ĉe Jugoslaviaj Fervojoj). Interne de la cirklo troviĝas fervoja rado kun flugiloj kaj kvinpinta stelo. Ekzistas nigra kaj verda stampoj. Aperis ankaŭ spe-

cialaj kovertoj kaj kartoj. Limigita kvanto estas havebla ĉe mi, kontraŭ 2 respondkuponoj (aŭ 1 rkp, se oni preferas la stampon sur simpla slipo, anstataŭ sur speciala koverto/karto).

Marinko GJIVOJE, II Armije 21, YU-41040 ZAGREB-DUBRAVA, P;P. 5025 (Jugoslavio)

PRI GLUMARKOJ FAVORE AL LA LEPRULOJ skribas d-ro J. KONDOR, D-545 Neuwied 21-Engers, Alte Schloßstrasse 25, Feder. Resp. Germanujo: "La 18-an de januaro 1975 mi eldonis 82.400 ekzemplerojn, sur 2575 folioj. Unu folio entenas 32 glm, en tri koloroj. La ideo devenas de mi, sed la desegnaĵon pretigis patro Urban KOCH, kaj presis la fama presejo PAULUS & THEWALT en Hörgrenzhausen (Westerwald), proksime al Koblenz".

MANKOLISTO DE E-POŝTSTAMPOJ de Stanisław BIE-SIADA, skr. Poczt. 44, PL-42-201 CZĘSTOCHOWA, Pollando:

Aŭstrujo: 5 ni, 8 ve, 8 ni, 13/2, 15/3

Belgujo: 5

Brazilio: 1, 2, 3, 4, 5, 8, 9, 10, 13, 16, 22, 23

Britujo: 3

Bulgario: 1-1, 1-2

Francujo: 1, 4, 5, 9, 13

German. 4, 5-1, 5-2

Hisp. 1, 2

Ital. 1, 6, 12 ni

Jugoslav. 2-2 ni, 3, 4-1, 4-2, 12 ve, 15 ni

Monako: 4-a tipo

Nederl. 4/1939

Norveg. 2

Svedujo 1, 2

---

Mi daŭre interŝanĝas, aĉetas kaj vendas E-filatelaĵojn!

Antonio DE SALVO, C.P.4017, ROMA APPIO

PRI GLUMARKOJ - PAROLAS TREMON  
=====

Mi unue devas danki diversajn samideanojn, kiuj sen dis al mi foliojn aŭ specimenojn de noveldonitaj glumar-koj. Dank'al tiuj informoj, mi povos iom post iom prepara la sekvontajn listojn por la katalogo.

Pri la jaro 1974, mi konas nun (12.4.1975) jenajn glumarkojn:

- Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novjaron 1974. 21x35
- 58-a brita kongr. de Esp. SHEFFIELD 1974. 39x38. Folio:?
- 59-a U.K. de Esp. HAMBURG 74. Ø 31. Folio:?
- Congrès regional Languedoc -Roussillon. BEZIERS. 10.3.74. 140x77
- 26-a IFEF-Kongr. TARRAGONA. 11-17.3.74. Folio:?
- 29-a SAT-Amikaro-Kongr. AGEN. 13-16.4.74. 41x51. Folio: ?
- 4-a Amikeco-kongr. BAUGE. Franc. 17-20.5.74. F: 6, nur 2 okazaj
- 34-a Hispana kongr. VALLADOLID, 16-22.6.74. 29x41. Folio: 2x3= 6
- 25-a Hungara Esper.-Kongr. SZOLNOK 21-23.6.74. 30x44. Folio: ?
- BUDAPEST. Internacia Foiro. B.N.V.18-26.7.74 51x34. Folio: ?
- 30-a SAT-Amikaro-Kongr. SAINT JUNIEN. 29-31.3.74 (erara dato) 38x45
- 47-a Espera.Kongr. SAT. BERGAMO.3-9.8.74. Folio: ?
- 16-a kataluna Esper. Renkontiĝo CERVERA. 7-8.9.74. 41x41. Folio:?
- C.N.E.O. 1974. 31x42 (eble mark-kotizo: ĉu por-okaza?)

- FilATELISTOJ: kolektu...per Esperanto. BUDAPEST 66. R 74. Ĉu okaza?
- 4-a Vintra Esperantista Ferio. BUDAPEST. 29.12.74-3.1.75. 31x46. Folio: ?
- 30-a Intern. Junul. Konferenco MÜNSTER 4-10.8.74. 35x50. Folio: 3x3=9

### Pri la jaro 1975:

- Association "La heredo". ORLEANS. 29.1.75. Pap.: 82x23. Trê.
- 53-a germana Esper. Kongr. OBERKIRCH. Pentekoston 75. 43x36. Folio: ?
- Congrès regional Languedoc-Roussillon. LUNEL. 9.3.75. 102x102
- 48-a SAT-kongr. DEN HAAG. 26.7-2.8.75. 44x38. Folio: ?
- 60-a Univers. Kongreso de Esperanto KOPENHAGO. 26.7-2.8.75 30x30. 2x5=10
- 27-a IFEF-kongreso VILLACH. 10-16.5.75. Folio: 2x5=10. 4 koloroj.

### Neokaza :

- Helpu al la lepruloj. 542 LAHNSTEIN. Germ. 35x35. Folio: 4x7=28.

Kiu povas doni pliajn informojn pri la sekvantaj glumar-  
koj?

- Ogólnopolski. XVII Kongres Esperantistów. SZCZECIN 21-23.7.63 (?)
- XVIII Esp. Kongr. SOPOT. 24-26.4.73 (koloroj, folio, formato ?)
- Pokalo, stelo, duobla kadro. IX-a B.E.T. viola. 1967. (ĉu kaŭĉuka stampo?)

Mi kore antaŭdankas ĉiujn

Gaston TREMON, 31 rue Turgot, F-87350 PANAZOL  
(Francujo)

## DANTE ALIGHIERI KAJ KOMUNA LINGVO

(El artikolo de profesorino Clelia CONTERNO GUGLIELMINETTI, aperinta en la gazeto "LEsperanto" n.93 de majo/junio 1965, ni ĉerpas kelkajn interesajn konsiderojn pri la sinteno de Dante Alighieri fronte al lingvaj problemoj)

Grandan komunan sonĝon revis kaj Dante kaj Zamenhof: la unuecon de la lingvo. Dante revis pri nacia ita la lingvo naskiĝanta el la diversaj dialektoj, kaj kuraĝis krei ĝin, konfidante al tiu lingvo sian ĉefverkon. Zamenhof revis pri internacia lingvo, naskiĝanta el la diversaj lingvoj, kaj havis la obstinan paciencon ĝin krei, kaj luktadi por ĝia firmiĝo. Ambaŭ diris, pri sia kreitaĵo, "la lingvo, kiun oni aŭdas ĉie, kaj kiu estas nenies propraĵo"; ambaŭ asertis, ke la komuna lingvo (interregiona/internacia) jam ekzistas potenciale en la naturaj lingvoj, kaj simple oni devas ĝin eltiri en tiuj; ambaŭ batalis kontraŭ la opinio, ke la lingvoj estas io origina kaj natura en la homo, intima kaj kaj ne mekanika fakto; kaj Dante tiel resumis sian teorion, en la "Paradizo":

Natur' efikas, ke la hom' parolas:

sed, tiel aŭ aliel, ĝi vin lasas

konduki poste laŭ belplaĉo via

(Parad., XXVI, 130-132, trad. Johano PETERLONGO).

Dante kaj Zamenhof devis alfronti la samajn akuzojn por triumfigi la idealon de lingvo, kiu estas "nenies propraĵo"; kaj eĉ oni povas demandi de si mem (kun respondo verŝajne negativa) ĉu Zamenhof konis la paĝojn de la verko de Dante "De Vulgari Eloquentia" (XVI, 4,6), kies vortojn li ripetas tre detale, kaj ĉu li konis tiun longan pecon de la verko de Dante "Convivio", kiu pritraktas la "kvin abomenindajn kaŭzojn" pro kiuj la homoj opozicias kontraŭ la nova lingvo (la

itala de Dante, aŭ Esperanto de Zamenhof, la historio ripetiĝas!). Nome, la akuzoj naskiĝas el nekonfeseblaj kialoj (I Conv. XI, 2 sekv.): "blindeco en la rezonado", ĉar oni prijuĝas la lingvon nekonante ĝin; "malica preteksto", ĉar, nekonante ĝin kaj ne scipovante ĝin uzi, oni opinias, ke ĝi ne havas literaturan valoron; "deziro de vanteco", ĉar oni fieras, ke oni konas unu aŭ plurajn fremdajn lingvojn; "fonto de enviemo", ĉar naskiĝas envioj kaj ĵaluzoj el la fakto, ke iu ne kapablas uzi la novan lingvon samnivele kiel aliaj, kiuj penis por lerni ĝin; "malkuraĝo", ĉar oni timas aperi ridinda.

Multe, kaj prave, oni celebris en Dante la poeton, neglektante la filologon, kies unua demando al Adamo, ĉe la renkontiĝo en la "Paradizo", estas: "Kian lingvon vi parolis?". La respondo estas emfazo de la "artefariteco de tiu lingvo: "...lingvon uzis mi kaj faris" (Parad. XXVI, 114), kie la pozicio de la pronomo "mi" substrekas la orgojlan fierecon de la unua aŭtoro de homa lingvo."

(traduko de Antonio DE SALVO)

P.S. Ekzistas pluraj filatelaĵoj pri Dante; por eventualaj interesitoj, mi havas je dispono kelkajn duobl-aĵojn - Antonio DE SALVO

## POŝTOSTAMPOJ ANONCITAJ

---

Laŭ informo de U.E.A., la sveda grafikisto Franko LUIN, kiu desegnis la emblemon de la 60-a Universala Kongreso en Frederiksberg/Kopenhago (kaj la kongresan glumarkon), preparis ankaŭ la oficialan poŝtan stampilon, kiun uzos la PTT-giĉeto en la kongresejo, sur ĉiuj poŝtaĵoj, en la tagoj de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1975. Poŝtostampo estis petita ankaŭ okaze de la 36-a IKUE-Kongreso en Romo (dum aŭgusto).

SUPLEMENTO AL LA STAMPKATALOGO 1974

---

(kompilis: Rudolf BURMEISTER, DDR-90 KARL-MARX-STADT, W.Wolff Str. 1 (Demokrata Resp. Germanujo)

- BRA 26 Marilia 1973 19-22.6 E-seminario (?)  
CS 17 Ostrava 3 1973 21.4. 2-a kongr. de ĈEA  
(ĝi ne okazis) 30  
CS 18 Poděbrady 1973 18-26.8 6-a ŝakturniro  
28  
CS 19 Opava 1 1974 7.9 5-a kunveno de E-fila  
tela sekvio  
BE 14 Liège 1974 13-14.4 Beneluksa E-kongr.  
(?)  
GFR 28 Hamburg 36 1974 27.7-3.8 59-a U.K.  
ovala 45x34  
GRE+ 1 Retimno 1972 (?) E-mediterranea semina-  
rio (?)  
GRE+ 2 Ateno 1973 8.8 Postkongreso de E-U.K.  
38x38  
FRA 41-1 St. Etienne 1974 febr.-aprilo Nacia E-  
kongr. ma 45x24  
FRA 41-2 St. Etienne 1974 febr.-aprilo sama kun  
PP en ds 45x24  
HI 16 Tarragona 1974 13.-15.5 26-a IFEF-  
kongr. 32  
HI 17 Valladolid 1874 18-22.7 (?) 34-a Nacia  
E-kongr. 32  
HU 40 Szeged 1974 12.5. Esperanto-tago (?)  
HU 41 Szolnok 1974 21-23.6 26-a hungarlan-  
da E-kongr 30x46  
HU 42 Gyula 1974 7-13.7 12-a SEU 27x37  
HU 43 Abaliget 1974 15-24.7 7-a IREN 23x45  
IT 23 Bergamo 1974 4.8 47-a SAT-kongr. 40  
IT 24 Verona 1974 15.9 45-a Nacia E-kongr.



32x32

JA 19 Kokura 1974 (?) 61-a Nacia E-kongr. (?)  
SVI 5-1 Bern 1947 27.7-2.8 32-a U.K. as 41x19  
SVI 5-2 Bern 1947 samdata sama apudsta, sen ur-  
bonomo en as

Afrank 12-1 Nürnberg 1 1973 U K HAMBURG  
1974 -Pickel  
12-2 Nürnberg 1 1974 sama kun "Druck-  
sache" (Presajo)

BU 5: konatiĝis ankaŭ datstampoj (nuligstampoj) de  
poŝtoŝicejoj "SOFIA" kaj "SOFIA C"

PO +18: forstreku tiun numeron, temas pri nepoŝta  
stampo

FRA 40: 10.2-4.4

CS 1: ĝis 7.8

HU 21: ĝis 6.8 HU 28: de 4.7

GFR 12, 16 kaj 27: datoj nekorektaj

JU 21: Beograd (sen 1)

PO 63: as 15.12

PO 64: as 15-17.12.1967

PO 49: ĝis 10.10- 11-a h

00000000°°°°°+++++°°°°°000000

## ESPERANTO-FILATELAĴOJ VENDATAJ EN AŬKCIOJ

Jam la duan fojon (laŭ mia scio) la filatela entrepreno  
"Christian WAPLER" en Okcidenta Berlino (Ilmenauer-  
str. 10, D-1000 BERLIN 33) aperigis Esperantaĵojn  
en sia katalogo de aŭkcioj per korespondado. Eble in-  
teresos niajn AREK-anojn koni la prezojn de ĉi tiu ma-  
terialo (temas pri bazaj prezoj, kiuj povas riĝevi plial-  
tigojn fare de eventualaj konkurantoj; kröme, oni de-  
vas aldoni la sendokostojn), aŭ almenaŭ scii, kio estas

ofertata. Ni ŝuldas la atentigon pri ĉi tiu katalogo al la afableco de sinjoro Richard HIRSCH:

- maŝinstampo "Nürnberg 1923": 22 germanaj markoj (ĉiuj prezoj estas en GM);
- München 1948 datst.: 9
- München 1951: 17
- Karl-Marx-Stadt 1967: 10
- København 1939: 30
- Helsinki 1958: 16
- Amsterdam 1931: 40
- Haarlem 1954: 15
- Amsterdam 1948: 20
- Oslo 1952: 12
- Ystad 1962 : 8
- Lund 1963: 8
- Orebrø 1964: 8
- Skövde 1966: 8
- Sundsvall 1968: 8
- Zürich 1955: 10
- Lugano 1972: 5
- Zaragoza 54: 17
- Ljuljana 1951: 15
- Beograd 1956: 15

Oni devas agnoski, pro rekta sperto, ke temas pri materialo en bonegaj kondiĉoj de konservado.

Estas interese, krome, ke la sama firmao ankaŭ ofertas (je prezoj same altaj kiel tiuj de la filatelaĵoj) simplajn Esperantaĵojn, ekzemple poŝtkartojn kun E-glumarkoj aŭ E-skribaĵoj!

Ankaŭ alia entrepreno, ĉifoje itala, ofertas E-fila telaĵojn. Temas pri la firmao "FILTEMA" de Graziano VERGARI; C.P. 50, SCANDICCI (Firenze), Italio. En la luksa katalogo n. 1 de 1975 estas ofertataj plura E-stampoj, je prezoj, kiuj varias inter 2.500 kaj 4500 liroj. Antonio DE SALVO

## PRI KOLEKTADO DE TUTAĴOJ

Mi devas konfesi, ke ĝis antaŭ nelonge mi tute ne kolektis tutaĵojn (kartojn, kovertojn aŭ aerogramojn kun oficiale presitaj poŝtmarkoj), kaj eĉ mi estis iom ĝenata, kiam oni skribis al mi per tiuj poŝtaĵoj, ĉar tio signifis, ke malpli da poŝtmarkoj eniras mian kolekton de uzitaj ekzempleroj...

De kelka tempo, tamen, mi komencis apreci la signifon (el la vidpunkto de la poŝto-historio) de la tutaĵoj, kaj ankaŭ mi ekkonsciis, ke tiu materialo povas efike kontribui al kompleta prezentado de iu difinita temo.

La dirita fakto des pli validas ĉe kolektado de Esperanto-filatelaĵoj, ĉar la E-poŝtmarkoj estas nemultaj (kaj kelkaj aŭ netroveblaj aŭ tro multekostaj), kaj la poŝtostampoj - sufiĉe abundaj en la lasta jardeko, precipe en kelkaj landoj - estas same ne facile troveblaj aŭ tro multekostaj se temas pri la pli frua periodo.

Trovi tutaĵojn, tamen, ne estas facila afero; tiuj neuzitaj estas pli oftaj ol tiuj uzitaj, se oni konsideras la memorigajn tutaĵojn (kaj tion oni komprenas, ĉar la kolektantoj malofte uzas specialajn tutaĵojn por korespondado, se ili havas je dispono ankaŭ ordinarajn ekzemplerojn, ĉar jam ĉe la poŝto la specialaj tutaĵoj estas pli malfacile akireblaj ol tiuj ordinaraj). Se temas, kontraŭe, pri ordinaraj tutaĵoj, inverse oni trovas sufiĉe facile uzitajn ekzemplerojn, sed malfacile iujn neuzitajn. Cetere, la situacio estas pli/malpli egala ankaŭ ĉe poŝtmarkoj, kie la ordinaraj pm, oftegaj en uzita stato, estas ĝenerale maloftaj kaj multekostaj en neuzita stato.

Mi ne havas grandan sperton koncerne tutaĵojn, en kies kampo mi estas preskaŭ nur komencanto; tamen, atendante la kontribuon de pli spertaj homoj, mi hodiaŭ

intencas nur skizi kelkajn simplajn opiniojn.

Laù la ideo, kiun mi faris al mi, oni povas kolekti tutaĵojn laù 4 principoj:

1) temo de la presita poŝtmarko. Ĝi estas sendube la plej grava aspekto el filatela vidpunkto, tiu plej strikte koneksa;

2) celo de la aperigo de la tutaĵo, nome okazo de la eldono (celebrado, memorigo, propagando de iu difinita afero). Iam ĉi tiu aspekto estis neofta, nun ĝi plioftiĝis (kelkfoje, tamen, temas pri privataj surprisoj, ne ĉiam rajtigitaj de la poŝto);

3) uzo de la tutaĵo, ĝenerale konekse kun speciala stampo (filatela, aù ankaù ordinara sed kun iu aparta intereso);

4) bildo - ne destinita al poŝta uzo - aperanta sur la tutaĵo, ĝenerale sen iu ajn rilato kun la presita poŝtmarko, aù kun la celo de la eldono, aù kun la poŝta uzo. Eble, ĉi tiu estas la malplej pravigebla el la 4 aspektoj, kvankam ĝi fariĝis la plej kutima.

Antonio DE SALVO, Roma

P.S. Mi havas intereson je aĉetado kaj interŝanĝado (eventuale ankaù vendo) de tutaĵoj, pri ĉiuj temoj, el ĉiuj landoj kaj de ĉiuj epokoj.

JE LA 90-a NASKIGDATREVENO de KATÒ HÂMÀN

(SUB ĈI TIU TITOLO APERIS ARTIKOLO EN LA REVUO "HUNGARA FERVOJISTA MONDO" n. 4 de 1974; ĉar, siatempe, la hungara poŝto eldonis poŝtmarkon memore al Katò Hâmàn, kaj verŝajne ne multaj scias pri la rilatoj kun Esperanto de ĉi tiu persono, ni aperigas ĉi tie resumon de tiu artikolo)

"En la lasta tago de la 21-a Kongreso de la Hunga

ria Socialdemokrata Partio, la 27-an de decembro de la jaro 1922-a, surpaŝis la oratoran podion blonda, mezalta laboristino. Ŝiaj karakterizaj trajtoj atestis, ke ŝi konas la malfacilaĵojn de la vivo. Saĝe ŝi motivis sian proponon, kiu en nomo de la Hungaria Esperantista Laborista Societo (HESL) rekomendis, ke la socialdemokrata partio enkonduku Esperanton anstataŭ la ĝis tiam uzitaj aliaj lingvoj en la internaciaj kontaktoj.

"Por tiu celo deklaru la hodiaŭa kongreso, ke en la plej proksima internacia socialista kongreso ĝi prezentos proponon pri enkonduko de la internacia helplingvo Esperanto kaj la akcepton de tiu propono ĝi helpos per ĉiuj siaj fortoj.

Krome decidu la partia kongreso, ke hejmlande ĝi jam donas la plej grandan apogon moralan kaj financan al la propaganda laboro de la esperantista laborista asocio en la intereso de la internacia helplingvo Esperanto.

Fine anoncu la partia kongreso ankaŭ tion, ke por tiu praktika celo ĝi petos HESL-on helpi la efektivigon de tiu programo".

La kongreso transmetis la rekomendon al la partia gvidantaro laŭ propono de la parti-sekretario István FARKAS.

Tiun akceptendan proponon prezentis al la kongreso Katò HĀMAN, eksa fervoja kasistino, kiu pro sia politika agado dum la Hungaria Konsilantara Respubliko (en 1919) estis poste eksigita. Katò Hāmàn ankaŭ komence de la 1920-aj jaroj estis entuziasma aktivulino de HESL.

Ŝi naskiĝis la 2-an de decembro 1884, en komunumo Kompolt (departemento Heves). Ŝia patro estis lampisto en la fervoja stacio Hatvan, kaj en tiu sama stacio pliposte fariĝis kasistino Katò Hāmàn. Rapide evoluis ŝia klaskonscio; ŝi travivis la grandan strikon de la

hungaraj fervojistoj en 1904 jam havante maturan pensmanieron. Poste, la trajnoj, kiuj trapasadis la stacion de Hatvan, veturigante milit-taĉmentojn aŭ vunditojn, portis al ŝi en korproksimecon la teruraĵojn de la unua mondmilito. La mizero de la parencoj de l'soldatoj tre impresis ŝin, precipe konstatante la ekscesan vivmanieron de la milit-riĉuloj. La malamo kontraŭ la milito, la amo al la homoj kaj la pacdeziro portis ŝin al la laborista movado. Verŝajne jam en Hatvan ŝi ekkontaktiĝis kun la neleĝa fervojista movado.

En junio de 1918, Katò Hâmàn estis translokita en la kasejon de la ~~sua~~ ~~domo~~ Budapeŝt Okcidenta, kie ŝi kontaktiĝis kun socialistaj laboristoj havantaj jam sperton, kaj ŝi baldaŭ iĝis aktiva luktanto. Ŝiaj paroladoj de senpera tono, trasorbitaj per profunda konvinkiĝo, ŝiaj klaraj ~~ri~~ ~~markoj~~ baldaŭ faris ŝin populara, konata kaj amata ankaŭ en sia nova labortereno.

En la unuaj konsilantar-elektadoj aranĝitaj dum la laborista regado en 1919 Katò Hâmàn estis elektita membro de la Laborista kaj Militista Konsilio en la IX-a distrikto de la ĉefurbo. Pro tio, post la falo de la tiama laborista registaro, en 1920 ŝi estis forigita el sia fervoja posteno.

Komence ŝi lukris per okazaj laboroj; poste ŝi deĵoris en diversaj fabrikoj, daŭrigante sian aktivadon, luktante kun mizero kaj malriĉo. En laboristaj kulturorganizaĵoj, per organizado de Esperanto-kursoj kaj kunvenoj, ŝi serĉis kaj trovis kontakton kun la batalantoj de la laborista movado persekutataj kaj devigitaj al eksterleĝa agado. Poste ŝi aliĝis al la agado de la sindikato de la kemia industrio.

En 1924 ŝi estas unu el la gvidantoj de la organizanta opozicio de socialdemokrata partio.

En majo 1924 ŝi partoprenis kaj alparolis kiel depu-

tito de la organiza komitato de la laboristinoj, en la festa kunsido de HESL okaze de la 10-jara jubileo de ĝia fondiĝo.

Post hejmenveno el Vieno el la unua kongreso de la Partio de Hungarlandaj Komunistoj, en septembro de 1925 ŝi kune kun pluraj gvidantoj de la partio estis arestita kaj asignita al esceptleĝa tribunalo, kiu kondamnis ŝin je 28-monata arestado.

Pro malsaniĝo, oni sub kondiĉoj forlasis ŝin el la malliberejo post 18 monatoj.

La lasta jardeko de ŝia vivo kunfandiĝis kun la agado de la "Ruĝa Helpe". Ŝi zorgis pri tio, ke la suferantoj en la malliberejoj ricevu libro- kaj manĝaĵ-pakaĵojn kaj ke la parenkaro de la arestitoj ricevu konsolajn vortojn kaj la materian helpon de la partio. Pro sia konsekvenca, batalema konduto nove kaj denove ŝi estis arestita. En lastaj jaroj de sia vivo ŝi pasigis pli multe da tempo en malliberejo ol en libero. De suferoj turmentita, ŝia korpo pli kaj pli malfortiĝis. La 31-an de aŭgusto 1936 ŝi mortis 52-jara".

Béla GADANECZ

°°° ++++++ °°°

## POŝTOSTAMPO NEREKTE KONCERNAS ESPERANTO-AGADON

Okaze de la Sankta Jaro, estas uzataj en Romo multaj specialaj stampoj, ĉu ĉe Vatikanaj ĉu ĉe italaj poŝtoj.

Interalie, antaŭ la kvar ĉefaj Bazilikoj (Sankta Petro en Vatikano, Sankta Johano ĉe Laterano, Sankta Paŭlo ekster la Muregoj kaj Sankta Maria La plej granda) en la periodo inter la 24-a de decembro 1974 kaj la 25-a de decembro 1975 poŝtaj aŭtomobiloj pri-zorgas poŝtan servon, stampante ĉiujn korespondaĵojn per stampiloj, kiuj montras la fasadon de la koncerna

preĝejo kaj la skribaĵon en latina lingvo "UT UNUM SINT" (= Por ke ĉiuj estu unu).

Estas interese, ke en la Baziliko honore al S. Maria "La plej Granda" (itale: Santa Maria Maggiore) deĵoras jam de multaj jaroj esperantista pastro (Giacinto JACOBITTI), kiu ankaŭ konfesas en Esperanto, kiel klare indikas ŝildeto sur la konfesejo. Pastro JACOBITTI, interalie, organizis en 1962 la Internacian kongreson de IKUE (kies devizo estis ĝuste "Por ke ĉiuj estu unu"!), kaj nuntempe estas organizanta la IKUE-kongreson de ĉi tiu jubilea jaro.

Oni povas aldoni, ke en la Baziliko S. Maria Maggiore oni celebradis, dum multaj jaroj, ĉiudimanĉan esperantlingvan meson (nuntempe, ĝi okazas en la tute apuda Baziliko honore al S. Prassede).

Fine, kuriozaĵo: kiam oni petis de la italaj poŝtoj la uzon de speciala stampo en Esperanto okaze de la venontaŭgusta IKUE-kongreso en Romo, la Poŝtoj komence respondis, ke oni povas rajtigi nur stampojn en la itala; je tio estis facile rebati, ke ĝuste la menciitaj 4 stampoj entenas frazon en alia lingvo, nome en la latina...

Antonio DE SALVO, Roma

P.S. Kompreneble, por eventualaj interesitoj mi havas je dispono, por interŝanĝo, la menciitajn stampojn.

)))))))------((((((

Delonge mi ne havas informojn aŭ vivsignojn rilate kelkajn AREK-anojn (MAYER, TOTH Vince, LEVIĈAROV, CHAMPAGNE, PEEV, MAEKAWA, BOBERG, GALESKI..) Kio okazas ĉe ili?

Antonio DE SALVO, C.P. 4017, I-00100 ROMA  
APPIO (Italujo). fino-fino-fino-fino-fino-fino-fino

---